NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj ĉraras Lupe Sanz SEPTEMBRO-OKTOBRO 1998

*Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto*

## HISPANIO

Gracia Mosteryrín trovis kuriozan etikedon en vestaĵo: Esperanto S.A. Barcelona. España. Made in Spain. Ĉu iu (precipe el Katalunio) povas informi nin pri la adreso de tiu-ĉi entrepreno?
La unuan dimanĉon de ĉiu monato, la E-Grupo de Bilbao instalas inform-tablon en la plej vizitata placo de la urbo, kadre de la ĉiudimanĉa bazaro de uzitaj libroj kaj revuoj, inteĉanĝejo de potmarkoj, moneroj, telefon-kartoj, ktp.
Ekde Malago, Andaluzia E-Unuiĝo elsendis dum aŭgusto ĉiusemajnan E-programon

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

En la suplemento "Ciberpaís" de la 2a de julio aperis en la fako "navegantes-sitios" informeto pri la multlingva inform-centro je la adreso http//:www.esperanto.net
Ĵurnalisto de nov-agentejo EFE intervjuis al Manoloj Parra kaj Pancorbo kaj dissendis noton al sia ĵurnal-reto: Diario-16 aperigis novaĵon pri esperanto la 19a de julio
En julio Onda Madrid kaj RNE-1 elsendis intervjuon al Marcos Cruz kaj en septembro Onda Norte al Manolo Parra
La revuo "Nova Badia" de Badia del Vallés, en ĝia lasta paĝo aperas kurso de Esperanto prizorgata de Antonio Quintana.
Laŭ titolo "El idioma de la amistad" la ĵurnalo "Diario de León" (1998-07-02) eldonis artikolon pri germanaj esperantistoj kiu pilgrimis al Santiago de Compostela akompanataj de Augusto Casquero
La radio de la norda kvartalo de Madrido "Onda Norte" (FM 107,3) faris unu horan programon pri esperanto, partoprenis Juan del Castillo, Ana Mareno, Manolo Parra kaj Marco (sen s, en estas Marcos Cruz)


## NOVA INTERNACIA LINGVO

Laboristo de Eŭropa Unio, Diego Marani. kreis novan lingvon nomata europanto. Li mem diras ke estis ludo kiu uzas miksaĵojn de la plej konataj vortoj de aliaj lingvoj. Li ne estas kontraŭa al esperanto kaj asertas ke esperanto estas vera internacia lingvo. Pere de lia "amuza" lingvo Diego esperas kapti atenton de uloj rilate al Eŭropa lingva internacia problemo. La franca TV France 2 intervjuis al Marani kiu havas humoran sekcion rilate europanto en la ĵurnalo "Le soir illustré". La elektronika poŝto estas la medio por disvastigi europanton, vi povas legi tekstojn ĉe:

www.student.info.ucl.ac.be:8080/HomePages/husson/europanto.html

Kiel ekzemplo ni inkludas "Nia Patro" *Vader nostro nel skay volante - tiene name sancto esse - tiene will noman disccusse - Up el skay und in der mundo - nostro bread give nos allesdag - nostros debts forgive nos tambien - comme nos forgivons nostros debitors - En pushe nos in tentazion - aber libera nos del mal. Amen"*

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ




La liceanoj César Mosteryrín, Angelita Sanz, Jaime Vinielles y Pedro Garrote partoprenis en la universala kongreso de Francio. Ankaŭ David, la vigla helpanto ĉe HEF ĉeestis en Montpeliero kaj en junulara renkontiĝo okazinta en Kroatio.
6-a Esperanto Semajno de la Kulturo kaj Turismo. 3-10a oktobro. Calafell (Tarragona)
84-a UK Berlino (Germanio). 31-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto 1999.
Temo: *Tutmondiĝo: ancoj por paco?*
http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html

## EŬROPARLAMENTANOJ

Hispanaj EP-anoj kiuj. diversgrade, opinias ke esperanto povus iel helpi al solvado de la lingva problemaro en Eŭropa Unio estas 7 inter 64. Entute 120 (19,16%) inter 626 Eŭroparlamentanoj

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79

En la eksterordinara asembleo de HEF okazinta la 5 de septembro aprobis unanime modifon en la statutoj laŭ peto de la Ministerio rilate la titolo de publika utilico "los cargos directivos han de ostentarse sin remuneración económica"

Okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo de Lorca, tradukita de Miguel Fernández, aperis la duan eldonon de "Sanga nupto", la pasia dramo pri forrabo de fianĉino, kun andaluzia fono sed universala valoro. Eldonis Andaluzia E-Unuiĝo kaj Hispana Esperanto-Federacio kiel nº 8 de la kolekto "Hispana literaturo"

UEA HISPANA ĈEFDELEGITO

La nova ĉedelegito de UEA por Hispanio estas Augusto Casquero (Avda. de Burjasot 29, esc A-8°-31. 46009 Valencia), al kiu devas konsulti por ĉio rilatanta al UEA . La delegito nur pretas respondi al demandoj pri praktike ĉio ajn, helpi okaze de vojaĝo ktp. Pri kotizoj kaj aliaj pagoj al UEA funkcias perantoj (Hispana Esperanto-Federacio kaj Kataluna Esperanto-Asocio)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

PRELEGOJ: 28 an de septembro "Someraj Esperantaj Kongresoj"

16 an de oktobro, vendredo. 19.30 h. Prelego "Lorca, poeta universal en la lengua internacional. Homenaje a Federico García Lorca en el Centenario de su nacimiento". Miguel Fernández. Casa de Guadalajara en Madrid. Plaza Santa Ana 15-1°

19 an de oktobro "Impresoj pri Anglio". Manolo Parra

Kursoj: Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3°-7 Tel. 91 446 80 79.

EKSTERLANDE

La hispana danc-ensemblo "Centro Aragonés de Valencia" tre konata de esperantistoj pro sia partopreno en E-valenciaj kongresoj, atingis grandan sukceson kaj gajnis la premion por grupoj kaj por solista dancisto (ĉi kaze paro) en la Internacia Folklora Festivalo de Torun (Pollando) kiu uzas esperanton kiel pontolingvo.

Grezillona kastelo, la fama esperanta kultura centro devis nuligi siajn somerajn staĝojn, pro problemoj kun la franca administracio: la kastelo en estas sufiĉe sekura

Manolo Parrra kaj Ana Manero pere de pastportaservo vizitis Anglion dum aŭgusto. En la la Londona Esperanto-Klubo kaj konstatis la bonan agadon de la londona esperantistoj

KOTIZO POR 1998 KUN DONACO

Legu nur se vi havas ruĝan signalon ĉi-tie □

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj ses jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin sendi ĉekon po 2.000 pesetojn, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL. Se vi pagas rekte al la kasisto en nia kunveno, lunde vespere en Rodriguez San Pedro 13-3°-7) vi ricevos kiel donacon esperantan T-ĉemizon*

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
San Alejandro 6-4°B. Ext
28005 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal